2e Année. N° 16. Le Numéro : 10 cts. Mai 1912.

# LA DEKSEPA

Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVIIe Arrt
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
**179, Boulevard Pereire, Paris.**

ABONNEMENT : **1 franc** par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

## Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVIIe Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

### Notre Dîner mensuel.

Les prochains Dîners mensuels de la Section auront lieu les Mercredis 1er Mai et 5 Juin 1912, à 8 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

### Prochaines causeries.

1er Mai. — Dîner mensuel suivi de jeux espérantistes.
8 Mai. — S-ro Radomir Klajić : Pri Serblando (lumbildoj).
15 Mai. — S-ro Devjatnin : Literatura Festo.
22 Mai. — S-ro F. Millien : Vojaĝo de Marseille ĝis Saïgon (lumbildoj).
29 Mai. — S-ro G. Daniel : Pri Astronomio (lumbildoj).
5 Juin. — Dîner mensuel suivi de jeux espérantistes.

*Le Secrétaire :* ROBERT BOLLACK.

# Congrès de la Société Française pour la Propagation de l'Esperanto.

Notre congrès national, qui s'est tenu à Paris les 13 et 14 Avril 1912, a eu un légitime succès; beaucoup d'amis de province et quelques-uns de l'étranger se sont rencontrés à Paris à cette occasion.

Le samedi matin, 13 Avril, a eu lieu, dans une des salles de la Faculté de Droit, l'Assemblée des Délégués de la S. F. P. E. Après une discussion sur la propagande générale, ces délégués ont procédé à l'élection de 12 membres du Comité. Voici le résultat de ces élections.

Sont élus :

| | Noms | Ville de séjour | Nombre de voix |
|---|---|---|---|
| MM. | Durieux | Lille | 8.033 |
| | Rollet de l'Isle | Paris | 8.013 |
| | Demarcy | Beauvais | 7.554 |
| | Cart | Paris | 7.430 |
| | Meyer | La Rochelle | 7.338 |
| | D-ro Dor | Lyon | 6.776 |
| | Bourlet | Paris | 6.527 |
| | Boirac | Dijon | 6.205 |
| | Archdeacon | Paris | 5.491 |
| | Evrot | Chambéry | 5.456 |
| | Robert | Paris | 4.898 |
| | Rousseau | Levallois-Perret | 4.221 |

Viennent ensuite: MM. de Coppet (Paris) 4.021; Doré (Troyes) 3.739; Cotton (Paris) 3.464; de Ménil (Paris) 3.254; Mertz (Orléans) 2.981.

Le samedi après-midi nos hôtes ont visité les Gobelins, le samedi soir ils ont assisté à une fête charmante à la salle des Horticulteurs; enfin le dimanche 14 un grand banquet de 137 couverts nous a réunis, avenue du Maine; en dehors des militants espérantistes, nous citerons la présence de MM. Aubriot, député, et Hénaffe, conseiller municipal de Paris. Pendant ces deux journées il y eut toujours beaucoup de cordialité et au banquet beaucoup d'enthousiasme.

Nous ne citerons aucun nom de nos samideanoj : il y en aurait trop : cependant nous ne pouvons nous empêcher de remercier publiquement le Comité d'organisation de ce congrès, c'est-à-dire nos bons amis de la Section du Quartier Latin.

« *La Dek-Sepa* ».

## En Bordeaux.

Tre afabla estis en Bordeaux la akcepto al la kongresanoj de la Federacio de Sud-okcidenta Franclando ; plie la vicurbestro de Bordeaux ĉeestis ĉe la kongreso kaj la konata gazeto de Bordeaux, *La Petite Gironde*, detale parolis pri la kongreso. Sukcesis ankaŭ multe la ekskurso en la rava banurbo Arcachon. Ĉe tiu kongreso, kiu okazis dum Pasko 1912 (7-an kaj 8-an de Aprilo) partoprenis esperantistoj el Bilbao, San-Sebastian, London, Bordeaux, Beauvais, Limoges, Paris, Terrasson, Toulouse, La Rochelle, Villeneuve-s.-Lot, St-André-de-Cubzac.

Notinda estas unu el la decidoj de tiu kongreso : tio estas, ke de nun, dum la kunveno de la delegitoj de la federacio, **ĉiu ĉeestanto** rajtos esprimi sian opinion pri la pritraktata temo ; jen pruvo de la liberemo de niaj sudokcidentaj samideanoj.

ROBERT BOLLACK.

## Jubilea Festo de Esperanto.

La 2-an de Junio, dimanĉe, okaze de la 25-jara Jubileo de nia kara lingvo, la « Zamenhofa Artista Adeptaro », kun partopreno de la « Estudiantina Cœcilia » (orkestro de tridek mandolinistoj, direktata de S-ro Besnard), organizas grandan Jubilean Koncertfeston, en la salonego de la Kafejo Valois (9, rue de Valois).

La programo konsistos el 18 diversaj numeroj de deklamado, kantado, muziko, k. t. p. Post la koncerto — dancado ĝis la 2-a nokte.

**Enirbiletoj po 1 franko estas vendataj** : Kafejo Valois, **9, rue de Valois.**

**Venu, gesamideanoj-Zamenhofanoj !**

# LA MONATO ESPERANTISTA

La plej grava okazintaĵo depost la lasta monato estis la Kongreso de la S. F. P. E., kiu ĵus fermiĝis kun granda sukceso. (Vidu detalojn aliloke.)

El Azio oni sciigas, ke en Mukden la grupo enhavas nun 300 membrojn, kaj la delegito de U. E. A. en Shanghai eldonas plej interesan gazeteton « La Mondo » (« Esperanto », Aprilo).

En Anglolando la katolika esperantista movado rapide antaŭeniĝas.

La V-a Kongreso de la « British Esperanto Association » okazos en Irlando, dum Pentekosto. (« British Esperantist », Aprilo.)

En Aŭstrolando, la 8-a Universala Kongreso rapide pretiĝas, kaj agadas por ke ĝi estu nova grandega sukceso. (« Esperanto », Aprilo.)

En Budapest, oni organizas la 3-an Kongreson de la Katolikaj Esperantistoj, al kiu jam promesis aliĝi kaj subteni multaj episkopoj. (« La Verda Standardo ».)

En Franclando, la « Konkurso Michelin » ne estas ankoraŭ preta kaj oni ne ankoraŭ konas plej etajn detalojn pri ĝi. (« Bulletin de la S. f. p. E. ».)

En Paris okazis la jara kunveno de la Grupo de Paris, kiu estis iom tumulta.

La « Zamenhofa Artista Adeptaro » donis la 25-an de Marto sian duan feston, kiu tute bone sukcesis. Ĉe la proksima festo (4-an de Majo), estos ludita originala 4-akta komedio de S-ro Devjatnin.

Fondiĝis nova asocio, la « E. S. F. I. O. », Asocio de la Francaj socialistoj Esperantistaj, kiu celas propagandi Esperanton inter la anoj de la Franca Socialista Partio. (« Paris-Esperanto ».)

Novaj gazetoj : « Le Travailleur Espérantiste » (Paris), kaj « Finna Esperantisto », kiu reaperis. Ankaŭ baldaŭ reaperos sub nova titolo, la mortinta « Scienca Revuo ».

Esperantiaj kunvenoj (U. E. A.) okazis en Capetown (Sudafriko), Heliopolis (Egiptujo) kaj Capodistria (Aŭstrolando).

Novaj kursoj okazis en Milano, Cordoba, Wien, Peterburg, kaj multaj aliaj urboj.

Inter la novaj libroj, plej bonaj estas : « La Konfeso », de Tolstoj, « La Vendetta », de Balzac (Presa Esp. Societo, Paris), « En Danĝero », originala drama teatraĵo de Untermann, « Hungaraj Rakontoj », (en la kolekto de Borel, Berlin).

La Esperantistaro suferis gravegajn perdojn dum la lastaj semajnoj.

Lia Moŝto Kopassis, Princo de Samos, perfide mortigita dum festo. Estas dank' al li, ke Esperanto estas nun oficiale instruata en la insulo.

Leŭtenanto Mannevy, el Condé, fervora Esperantisto, mortigita dum batalo en Maroko.

Fine, S-ro W. Stead, la mondkonata direktoro de la « Review of Reviews », el Londono, amiko kaj subtenanto de Esperanto de pli ol dek jaroj, kiu ĵus mortis en la submariĝo de l'ŝipego « Titanic », en la Oceano.

Al la familioj de la malaperintoj, ni sendas niajn plej sincerajn sentojn de ĉagreno kaj bedaŭro.

H. van Etten.


# Muzikeldonejo A. BESNARD

**26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS**

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj, violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.

Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

**SENSACIA NOVAĴO !!! ESPERANTAJ DISKOJ !!!**

| | | |
|---|---|---|
| KANTOJ | **La Espero** . . . . . . . | L. L. Zamenhof |
| | **Al vi** . . . . . . . . . | Bemberg |
| DEKLAMOJ | **Preĝo sub la verda standardo** | L. L. Zamenhof |
| | **Blanka vualo** . . . . . | V. Devjatnin |

*Ĉiu duobla disko :* **4 fr. (1,600 Sm.)**

**Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.**

# INTER NI

Kun ĝojo mi sciigas, ke nia simpatia ĉefredaktoro ricevis la ordenon « Oficiro de l'Publika Instruado », kiel profesoro de Esperanto !

☆

La 13-an de Marto, plej interesa kaj dokumente riĉa parolado pri gazetoj, farita de S-ro Pol Varton, el « Le Journal ».

☆

Estas kun ĉiam nova plezuro ke ni reaŭdis la paroladon « Pri la Kongreso de Dresden », faritan de Lia Prezidanta Moŝto Sinjoro de Coppet (Henriko, por la fraŭlinoj), kiu samtempe prezentis pli ol 100 lumbildojn.

☆

La unua parolado de nia amiko Nonin, el Châtillon, tute sukcesis. Multaj aplaŭdoj prave rekompencis lin.

☆

Mi ne parolos pri la Festo de la « Dek-Sepa » ; ĝi superis ĉion antaŭvideblan — pro la programo kaj pro la ĉeestintaro ! ! !

FUŜISTO.


KONTRAŬ MAR-MAL-SANO

**DELPHININE**

KONTRAŬ FERVOJ-MAL-SANETO

De l' DOKTORO FLASSCHŒN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : **10 fr.** (**4** $S$).

**Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.**

# LA VENONTAJ EKSKURSOJ DE LA « DEK-SEPA »

La « *Dek-Sepa* » organizas tri aŭtomobilajn ekskursojn dum la venontaj monatoj.

## 1-a Ekskurso.

Por respondi al la deziro de la Esperantista Grupo de Amiens, kiu petis de ni viziton dum nia intervidiĝo en Beauvais, estas aranĝita la 16-an de Majo, aŭtomobila veturado kun du aŭtomobiloj.

La ira kaj reira transportprezo estas fiksita *je 10 frankoj per persono*. (En tiu prezo ne estas enkalkulita la prezo de l' tagmanĝo, ĉirkaŭ 3 frankojn plie.)

La nombro de la partoprenontoj estante limigita je 14 personoj, ni *insiste* petas, ke oni *tuj* aliĝu, se oni deziras fari la ekskurson.

Por faciligi la laboron al la organizantoj, *estos nur definitive enskribitaj tiuj, kiuj antaŭpagos la fiksitan prezon de 10 frankoj.*

PROGRAMO :

Forveturo je la 6-a matene de la Porte Maillot. Alveno en Amiens ĉirkaŭ la 10-a.

Akcepto de la tiea grupo kaj vizito de l' urbo.

Ĝoja tagmanĝo sekvata de promenado aŭ dancado laŭvole.

Forveturo de Amiens je la 4-a posttagmeze, por alveni en Parizo ĉirkaŭ la 7-a vespere.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**LA VERA TIZANO DE L'PASTRO DE DEUIL**

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : **1** Fr. **50** (Sm. **0,60**)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

**Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.**

## 2-a Ekskurso.

Ĉiam en la samaj kondiĉoj, *fr. 10 per persono.*

La dua ekskurso okazos la 16-an de Junio al Louviers. La prezidanto de l'tiea grupo, S-ro Bontemps, bonvolis inviti nin ĉeesti la kongreson de la Esperanta Normanda Federacio, kaj ni kun plezuro akceptis.

La veturado al tiu interesa urbo estas absolute ĉarma, ĉar oni iros per la valo de la Seine kaj revenos per la valo de l' Eure.

☆

## 3-a Ekskurso, al « Fère en Tardenois ».

Ĉiam en la samaj kondiĉoj, *fr. 10 per persono.*

Nia karega mondvaganta sekciano, S-ro Mauchamp, invitis nin viziti sian eksterordinaran personan muzeon, unikan en Franclando, kaj kompreneble, ni tuj promesis plenumi lian deziron.

Ekster la tre granda intereso prezentita de tiu muzeo, « Fère en Tardenois », posedas rimarkindan malnovan kastelon el la 13-a jarcento, kiu meritas detalan viziton. Pentrinda vojaĝo tra la valoj de l'Aisne kaj de la Marne.

Tiu ekskurso okazos en Julio; la fiksitan daton ni anoncos en la junia numero de « La Dek-Sepa ».

---

Por aliĝoj al la tri supre cititaj ekskursoj, sin turni al S-ro Henri de Coppet, 179, boulevard Pereire, Paris.

---

SE VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

**MAYA BULGARE**

Bulgara Lakta Kazeaĵo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

**Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris.** Téléphone 214-40

# Nimfaj Ŝtonegoj.

De Elin-Pelin.

---

Perdiĝintaj por ĉasado en la krutegaj profundaĵoj de patrino « Stara Planina » (1), ni kun Ĉumako, — fama monta ĉasisto, travivinta kvindek jarojn en vagado tra la sovaĝaj balkanaj arbaroj kaj dezertoj, — trankvile ripozis sub la densaj fagaj ombroj apud bruanta torento. Paco kaj grandega arbara silento regas ĉirkaŭe kaj kvazaŭ englutas la sovaĝan eĥon de la bruado de torentoj kaj akvofaloj, kiu senĉese resonas en la mallumajn kaj malvarmetajn krutegaĵojn kaj disportiĝas kiel iu vivega, vigliga kanto tra la sovaĝaj arbaregoj. Super ni senŝanceliĝe, rekte kaj aspire sin levas altaj pintoj kaj sentime pentras en la ĉielan lazuron siajn nudajn, ŝtonegajn, kun kruda beleco fruntojn. Sed ankoraŭ pli alten, super tiuj nekompareblaj grandeguloj, en la blua ĉielo flugvolviĝas malrapide kaj trankvile aglo, — monta reĝo, — kun neatingebla kaj sentima flugo.

Mi, libere kuŝiĝinta dorse sur malseketa kaj verda tapiŝo el sovaĝa herbaĵo kaj bonodoraj geranioj, kuŝas kaj rigardas la grandan, potencan kaj ostan figuron de la maljuna Ĉumako, kiu, sidiĝinta apud mi, atente kliniĝinta kaj kun nuda kapo, purigis sian neerarantan « ŝiŝene »'on. Sur lian altan, malkavan kaj malglatan frunton falas malgrandaj ŝvitaj, faskoformaj pendaĵoj de liaj arĝentogrizaj haroj kaj mirinde ornamas lian iomlongan, sekan, sed sanan kaj ruĝan vizaĝon, sur kiu, kiel ĉiam, kuŝis la majesta trankvileco de hardita kaj libera animo. Liaj densaj pendantaj brovoj, la ĉasista rigardo de liaj kafkoloraj okuloj kaj liaj longaj, arĝentosilkaj lipharoj, kies pintoj kuŝis preskaŭ sur liajn ŝultrojn, aldonas ian mirindan allogecon kaj respekton al lia tuta heroa korpo.

Li levis sian » ŝiŝene »-pafilon kaj ŝerce akcelis al la senfina alteco la nigran punkton de la aglo, kiu traflugis sub la suno kaj kiel malgranda nubeto ĵetadis malluman ombron

---

(1) La plej granda monto en Bulgarujo (« Maljuna Monto »), nomata ankaŭ « Balkano ».

sur la bluajn ŝtonegojn kaj terruinojn de la kontraŭaj montsuproj.

— Se la pafilo celus laŭ la okulo, mi trafus tiun malbenitan birdon.

Kaj li ĝin eksekvis per okuloj en la ĉielon. Ĝi longe rondvolviĝis en la alteco, kaj jen malrapide ŝoviĝis malsupren kaj per senmovaj flugiloj faris larĝajn rondojn en la ĉiela spaco, jen potence ektremis kaj aspire altiĝis kaj malaperis en la lazuron. Poste ĝi rondflugis kaj kiel demono ŝoviĝis malsupren kaj ekstaris potence kaj reĝe sur la kontraŭaj akraj ŝtonegoj.

— Tio estas la « nimfaj ŝtonegoj », diris post ioma silento la maljuna Ĉumako. Nealireblaj, altaj, danĝeraj kaj plenaj je serpentoj. De kiam mondo ekzistas, tien homa piedo ne estas paŝinta, kaj mi dubas, ĉu iam paŝos. Ĉie, en la dissemitaj proksime kaj malproksime en la ĉirkaŭajo vilaĝoj la homoj kredas, ke de la pinto de tiuj ŝtonegoj estas videbla la fino de la maro, en kiu matene kaj vespere sin banas la suno.

Kaj la maljuna ĉasisto, ekspirinte, komencis rakonti al mi trankvile kaj egaltone, per voĉo, kiu ŝajne elfluadis el lia koro mem, mirindan legendon pri tiuj nimfaj ŝtonegoj, kiuj aspektas elpentritaj en la ĉielo, briligitaj de la radioj de la subiranta suno akraj, altaj, malproksimaj, nealireblaj, krutaj, kovritaj de muskoj kaj likenoj. Ĉirkaŭe sub ili valegoj, terruinoj, arbaroj, rokoj, senorde, uragane disjetitaj profundegaĵoj kaj abismoj.

Ĉe la profunda subpiedaro de tiuj pintoj estis vilaĝo, monta vilaĝo el dometoj dissemitaj kvazaŭ perditaj malproksime unu de alia en la arbaroj. Ĝiaj loĝantoj, samaj arbaraj idoj, vivis libere, kiel tiuj montaj agloj, kiuj ne konas timon kaj limon. En la mallumaj arbaroj tutan tagon oni estas aŭskultinta tondrojn de ĉasistaj pafiloj, sur la larĝaj herbejegoj estis eĥintaj sonoriloj de grasaj ŝafaroj, la krutegaĵoj estis tondrintaj de resonaj knabinaj kantoj kaj dolĉesonaj *kavaloj* (1).

Sed tiuj nealireblaj ŝtonegoj per sia sovaĝeco kaj majesteco ĵetadis ian riproĉon kaj mokon en la bravajn korojn de la junuloj, por kiuj ne ekzistis netrairita krutegaĵo, ne-

---

(1) Paŝtista blovmuzikilo simila al la ŝalmo, sed pli longa kaj malproksimaŭdebla.

atingeblaj altaĵoj. La kaŝita honto pezis sur la junaĵn animojn kaj ili ne povis sen kaŝita sopiro ekrigardi tiujn ŝtonegojn, kun la akraj pintoj, de kiuj oni povus vidi la maron, kie sin banas la fajra suno.

Kiu junulo ne dezirus vidi la plej belan aĵon de la plej alta loko? Sed kiu entreprenus tiun vojon, plena de danĝeroj kaj nekonataĵoj? Ĉiu patrino tremis ĉe la penso, ke ŝia ido estus allogota de la gloro de bravula faro. La junuloj pensis kaj sopiris.

Ankaŭ la juna Magdaleno aldonis ankoraŭ unu suferon al la junulaj koroj; ŝi estis la plej bela knabino en la mondo.

Magdaleno senzorge paŝtadis la kapraron de ŝia patro sur la montaj herbejegoj, kolektadis arbarajn florojn, plektadis kronojn kaj bukedojn kaj kantadis. Kaj vespere, kiam la suno kuŝiĝadis kaj per siaj lastaj radioj briligadis la altaĵojn, kie estis la dometoj de ŝia patro, ĝi adiaŭadis la plej belan paŝtistinon en la mondo, kiu, saltetante kiel senkulpa infano kaj ornamita per krono el orbrila primolo, irigadis domen sian amatan brutaron.

Kaŝite eksopiris la junuloj post ŝi kaj iliaj miele dolĉesonaj «kavaloj» malgaje ekvibris en la gajaj arbaroj kaj malproksimen disportis la gloron de Magdaleno.

Kaj jen ke el ĉiu flanko oni komencis konfuzi ŝian patron per proponoj de svatistoj. La famaj riĉuloj volis lin subaĉeti per la forto de siaj bienoj, la malriĉuloj, sed kun flamaj koroj junuloj, dezirantaj posedi tiun montan reĝinon, ekhavis neaŭditan kuraĝon por peti ŝian manon.

— Ŝi estas ankoraŭ tro juna, — unue respondis la maljuna patro, sed vespere, kiam li ŝin vidis enirigadi la brutaron, radianta de juneco, kun varmaj ruĝaj vangoj, kun okuloj brilaj kaj helaj, kiel arbaraj fontetoj, en kiuj brulis fajro de flamaj deziroj, li enpensiĝis.

— Mi ne estas mastro de ŝia koro, — komencis respondadi li, — ŝi mem elektu al si, laŭ sia volo, bravulon.

*Kun permeso de l'aŭtoro, el bulgara lingvo tradukis*

N. Ĥristoskoff.

(Fino en la venonta numero.)




*Vera Ferhava Salo alsimiligebla*

DE

M ... ROBIN

91.

LA

# Fer Robin

*mirinde efikas*

KONTRAŬ

SENSANGECO,
PALKOLORECO,
SANGELFLUOJ

ĈIUSPECAJ

**Akcelas la nutradon kaj neniam mallaksigas.**

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu manĝo, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

**Por eviti la falsaĵojn**

**POSTULU la nomon de ROBIN**

VENDEJO POGRANDE :

**13, Rue de Poissy, PARIS**



Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : E. OLLIVIER.